

## Sukcesa debuto de la novtipaj ekzamenoj - Raporto pri 2009

Dum ja jarfinaj aranĝoj okazis paralele en tri lokoj la lastaj pasintjaraj sesioj de la novtipaj ekzamenoj de UEA. Dum la Novjaraj Renkontiĝoj (NR) en Saarbrücken (Germanio) 10 personoj, dum Internacia Festivalo (IF) en Nördlingen (Germanio) 7 kaj dum la Junulara Esperanto-Semajno (JES) en Zakopane (Pollando) 6 personoj trapasis je la niveloj B2 aŭ C1 la ekzamenojn.

La novtipaj ekzamenoj, ellaboritaj laŭ la normoj de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) kaj okazigitaj kune kun la Ŝtata Lingvokezamena Centro (ITK) en Hungario nun fermis sian unuan jaron, dum kiu estis aranĝitaj 10 ekzamensesioj kun 126 kandidatoj je tri niveloj (B1, B2 kaj C1).

Kvankam en Francio mem ne okazis sesio, francoj estis la plej diligentaj kaj strebis je oficialaj testado kaj agnosko pri siaj lingvaj konoj kaj kapabloj. En la dua loko staras germanoj.

La detalan statistikon vidu [ĉi-sube](#).

Apartan laŭdon meritas junuloj, inter kiuj la ekzameniĝo fariĝis prestiĝa demando kaj kiuj povas kaj jam provis ekuzi sian diplomon por sialande oficiale agnoskigi la dokumenton. Tion ni konkludis el la oficiala letero, kiun la pola SEJM sendis al UEA por identigo de la ekzamensistemo.

**En la jaro 2010 estas planataj pliaj sesioj en Kubo, Usono kaj Eŭropo, eble ankaŭ en Indonezio.**

Konkrete kaj pli detale legu ĉe la [sesioj kaj aliĝoj](#).

Por plifaciligi la antaŭtestadon de niveloj de kandidatoj, baldaŭ eblos ekuzi retan provteston, kiu post la plenigo de la dokumentoj difinas la proksimuman nivelon kaj donas konsilojn pri pluaj lernopaŝoj kaj farendajoj.

Interesiĝantoj jam nun povas peti specimenojn kaj fruaj aliĝintoj al ajna sesio povas ricevi preparhelpon kaj ekzamenkonsilojn ĉe la teamo de [www.edukado.net](http://www.edukado.net).

Pliajn informojn pri la ekzamenoj legu kaj akiru ĉe [ekzamenpaĝo](#) aŭ **petu ĉe katalin(ĉe)ikso.net**.

\*\*\*\*\*



*Foto farita dum la skriba ekzameno dum NR, 2009*